

# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 9 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

4-a Kvaronjaro 1979

N° 73

## Pri nia Nacia Revuo

La nacia asocio decidis en sia lasta komitatokunsido alporti al la nacia revuo la necesan bezonatan puŝon por ĝia disvolviĝo. En la jaro 1980, kun ĉies helpo, ni intencas aperigi duoblon da paĝoj, kompare kun la nuna jaro. La ĝenerala enhavo (atingota iom post iom) estas la jena :

- 4 paĝoj kun titolo, ĉefartikolo, libroservo, listo de servoj de la asocio, kaj ties prizorgantoj ;
- 4 paĝoj kun la ĝis nun cirkuleraĵoj dokumentoj, nomitaj "La ŝlosilaj kluboj"...t.e. la vivo de la kluboj, kaj varbado-paĝoj ;
- 4 paĝoj por komencantoj, la nunaj lernejoj paĝoj kun gramatiko, ludoj, enigmoj, facilaj legaĵoj ;
- 4 paĝoj ESPERANTO EN LA MONDO (antaŭe ESPERANTO-ACTUALITES) kun raporto pri multaj okazaĵoj ekster Francujo, selektitaj por interesigi niajn novajn lernantojn ( kaj, kial ne, niajn konstantajn fidelajn krokodilojn). Tiu rubriko estos franclingva, tiel ke la esperantistoj ne timu abonigi bibliotekojn, magistratojn lice - aŭ lerjestrojn, universitatojn...eĉ politikajn aŭ asociajn simpatiantojn. Eĉ niaj nunaj abonantoj povos fotokopii tiujn paĝojn, kaj ilin afiŝi, aŭ diskonigi parte aŭ tute.

Tiun rubrikon anstataŭos, de tempo al tempo, paĝoj pri selektita temo ; ekz<sup>e</sup> argumentaro por difinita profesio aŭ difinitaj medioj...instruantoj, komercistoj sportistoj...Do, ankaŭ franclingve.

- 4 paĝoj : noveloj, rakontoj, poemoj, raporto...en, sed ĝenerale ne pri Esperanto , kaj finfine
- 4 paĝoj...pri FRANCUJO POR LA FREMDLANDO (kutimoj, turismo, historio, reklamo pri iu urbo aŭ regiono). Tiu rubriko estas principe destinita al nia nefranca legantaro kiun ni volas multnombri.

Evidentas, ke por tiu rubriko ni speciale skribas al vi, ĉar ĝi estos ĉies partopreno, aŭ ne estos !

Ni volas, ke F.E. estu legita ekster francujo, ĉar ni fieras pri nia laboro. Pruvindas ke turismaj oficejoj konsciu, iom post iom, ke ili povas uzi Esperanton por reklami eksterlande. U.F.E. faros la neceson por ke ĉiuj Esperanto-asocioj en la mondo aŭdu pri tio.

Vian helpon, ni bezonas. Bonvolu kopii tiun leteron, kaj ĝin montri al ĉiuj agemuloj de via regiono por ke la plej kompetentaj sin turnu rapide al la taŭgaj oficejoj turismaj, urbodomaj,?...por ke realiĝu tiu aideo.

Ni deziras do, ke en ĉiu numero, estu pritraktita unu regiono, aŭ unu urbo... Kion ni bezonas : artikolon pri la urbo, pri la ĉefaj vidindaĵoj, aŭ pri nur unu aŭ du se tio estas preferata ( ekz-e okaze de iu festivalo, aŭ escepta datreveno), artikolon pri la kutimoj plej originalaj, eventuale kelkajn lokajn amuzajn rakontetojn aŭ ŝercojn kiu tipigas la enloĝantojn...ktp...evidente ni pretas prezenti unu aŭ du fotojn, kaj mapeton...

Tre interese ankaŭ estus, se la koncernataj turismagentejoj konsentus partopreni al tiu propagando per pagita reklamo. Se ili volus fari tion alimaniere, ili ra-

...../.....



...../.....  
pide elspezus 10.000 frankojn. Je ni, ni promesas sendi 10 ekzemplerojn de la revuo al ĉiuj U.E.A. asocioj se la urboj partoprenos al tiuj kvar paĝoj, per 1.000 aŭ 2.000 frankoj ( ni retrodonos 25 % al la perantoj esperantistaj, grupoj aŭ individuoj).

Vi povas ankaŭ anonci ke ni presigos aparte pliajn paĝojn, kiuj tiel fariĝos taŭgaj dissendeblaj folioj. Tiam ni provizos ilin je debatota prezo ( tion vĉ aranĝos rekte kun nia kasisto aŭ kun la V.E.K.O.).

Karaj geamikoj, mi persone ege esperas, ke vi helpos nin tiudirekten. Ni ne pre bezonas interesan revuon por niaj novaj lernantoj, ĉi devas pruvi al la multaj esperanto-verbantoj ke, ankaŭ, la nacia revuo estas nemalhavebla por la disvolviĝo de Esperanto. Pri ĝia enhavo, ni ĉiuj laboru,

ĉies laboro ( unufoje en la jaro)  
gajtigos ĉiujn,

mi dankas vin,

plej amike kaj samcele via

Jean-Louis TEXIER  
U.F.E. Prezidanto

P.S. Ekde januaro, FRANCA ESPERANTISTO aperos je antaŭfiksitaĵoj, vi povos anonci en ĝi, se via informo trafos la ĉefredaktoron 30 tagojn antaŭ la dato. (Tiujn datojn ni donos en venonta numero). F.E. estos ofsetita, kaj havos ionete pli larĝan formaton.

FRANCA ESPERANTO - INSTITUTO

INSTITUT FRANCAIS d' ESPERANTO

LANGVEDOKO - RUSILJONO

SUKCESINTOJ en la EKZAMENOJ dum la JARO 1979

ATESTO pri LERNADO :

- |                          |                             |
|--------------------------|-----------------------------|
| COQUIN H el ene (B)      | TEDONE Odette (B)           |
| GRANIER Marie-Claude (B) | BOUMAL Camille (T.B)        |
| NICOLAS Ren e (S.B)      | CARTIER Jacques             |
| GIMALAC Marcelle (B)     | DUMAS Jean-Fran ois         |
| GIMALAC Th er ese (B)    | FERNANDEZ Juan (S.B)        |
| JOUBERT Claire (B)       | MALCHROWICZ Fran oine (S.B) |
| GUILLAUME Ren e (S.B)    | VAN GESTEL Paul             |
| TRIGAN Geoges (B)        | MEYNADIER Georgette (T.B)   |
| CASTETS Jean-Marc        | SAVARY Ginette              |
| CASTETS Jeannine (T.B)   |                             |

ATESTO pri PRAKTIKA LERNADO :

- |                        |                      |
|------------------------|----------------------|
| SALAN Georges (T.B)    | BOUMAL Camille (T.B) |
| CASTETS Jeannine (S.B) | BALOUET Jeanne       |
| VIALLA Gabriel (B)     |                      |

ATESTO pri KAPABLECO :

SALAN Georges (B)

PEDAGOGIA ATESTO :

SALAN Georges (S.B)

FEDERACIO "GARD"

La jara kunveno okazos Dimanĉon la 20 an de Januaro je la 9 1/2 a en Kultura Centro 2 pl. H. Barbusse ALES.

La kotizo estas sensanĝa (2 F). La membroj de Esperantista Kultura Centro en Nimes kaj tiuj de Verda Stelo en Ales pagu al la kasisto de sia grupo kiu trandonos.

La izoluloj pagu al P CK F ed eration du Gard pour l'ESPERANTO 1.857.07 A MONTPELLIER - ili aldonu 9 F. por abono al S F S.



ALLOCUTION de M. René LLECH - WALTER, Président fédéral

Monsieur le MAIRE ,

Monsieur de DEPUTE ,

MESDAMES , MESSIEURS ,

C'est toujours avec plaisir que l'on retrouve Montpellier, cité accueillante et son Maire, M. FRÉCHE que j'avais eu le plaisir de connaître au Congrès National de La Grande Motte, M. DUGRAND, Adjoint au Maire, Conseiller Général, M. BAYOU, Député. C'est à Montpellier que, pendant sept ans, j'ai donné un cours d'Esperanto à l'Ecole Supérieure de Commerce dont le Directeur était le regretté professeur de la Faculté de Droit, M. Morini-Comby. Je garde avec plaisir la carte de membre du groupe espérantiste de Montpellier, délivrée par Mme Rivière, Trésorière en 1958.

20 ans après, comme dans un certain roman, nous nous retrouvons, à quelques exceptions près, pour honorer la mémoire de notre vénéré maître, le Docteur ZAMENHOF.

En 1959, pour le centième anniversaire de sa naissance, le Congrès Universel d'Esperanto eut lieu à Varsovie ; c'est avec émotion que nous visitâmes sa ville natale Bialystok et que nous nous recueillîmes sur sa tombe à Varsovie.

C'est en effet le 15 Décembre 1859 que naquit Louis Lazare ZAMENHOF.

Dès l'âge de dix ans, il écrivit une tragédie en cinq actes dont le thème était la Tour de Babel. L'action se déroulait, non pas à Chinear, mais sur la place du Marché de Bialystok, et les bâtisseurs étaient les quatre ethnies, Polonais, Juifs, Russes Allemands, quatre alphabets, quatre religions, quatre haines. Zamenhof parlait couramment les quatre langues locales et savait par expérience que le pont linguiste franchi, les relations s'établissaient sur une autre base.

Il avait compris aussi que, pour le dialogue entre étrangers, il était préférable d'utiliser une langue née au niveau international plutôt que la langue d'un peuple donné. Il avait compris surtout qu'une langue résulte nécessairement d'un processus social, collectif et anonyme. Des milliers de projets de "langue internationale" ou de "langue universelle" avaient déjà été publiés, mais leurs auteurs n'avaient pas senti ce qu'était une langue et avaient proposé des codes rigides, préfabriqués, pour ainsi dire. Louis Zamenhof à 17 ans savait qu'une langue se constitue en grande partie, inconsciemment par l'usage. Pour lui, une langue était un organisme vivant, qui ne cesse de prélever des éléments dans le milieu extérieur, de les assimiler, d'en faire les matériaux de sa propre croissance et de rejeter ce qui ne s'intègre pas à son génie particulier.

A 19 ans, Louis Zamenhof disait à son père : "Je voudrais travailler à l'idée d'unir les peuples. La diversité des langues est le plus grand obstacle à cette union. Plus tard je donnerai ma langue internationale aux hommes et je les inciterai à l'apprendre".

Son père n'était pas du tout d'accord et brûla même les manuscrits de la langue internationale pendant que son fils finissait ses études de médecine à Moscou.

Lorsqu'il revint à Varsovie, le jeune Louis dit à sa mère éplorée de voir cet autodafé : "Ne pleure pas maman; tout se trouve dans ma tête : c'est le meilleur cahier. Je referai toute la langue et je la perfectionnerai".

Il tint parole et le 14 Juillet 1887, ou un 14 Juillet aussi, parut le premier livre d'esperanto. En Juin 1891 la méthode avait déjà été publiée en 17 langues.

En Janvier 1898 se fondait à Paris la "Société pour la Propagation de l'Esperanto" et le premier congrès universel eut lieu en France en 1905, à Boulogne sur Mer; on peut dire que là eut lieu le miracle de l'intercompréhension. Imaginez des centaines de personnes appartenant à 20 nations, ayant appris chez eux l'esperanto, rencontrant pour la première fois des étrangers et, ô miracle, se comprenant les uns les autres. Le gouvernement français, reconnaissant les mérites du Dr Zamenhof, le nomma Chevalier de la Légion d'Honneur.

...../...../...../...../.....



...../.....

Après Boulogne, ce fut Genève, Cambridge, Dresden, Barcelona, Washington, Antwerpen, Cracovie, Bern et le 2 Août 1914, devait s'ouvrir à Paris le 10ème Congrès d'Esperanto où avait adhéré 3739 espérantistes de 40 pays. Bien que les bruits de guerre se fissent de plus en plus menaçants, Louis Zamenhof et son épouse se mirent en route pour le Congrès. Ils avaient à peine atteint Cologne que les hostilités éclataient entre l'Allemagne et la Russie. Comme citoyens d'un Etat ennemi, ils reçurent l'ordre de quitter immédiatement l'Allemagne. L'attitude des employés et des cheminots devint inamicale. Tout à son oeuvre de paix, Zamenhof ne pouvait croire à une aussi subite et complète transformation. La santé du Maître s'était aggravée, non seulement à la suite des difficultés de ce voyage, mais aussi à cause du choc terrible qu'il avait ressenti; il avait prédit la fraternité aux hommes et il assistait à la ruine de ses rêves et de ses pensées. Il revint chez lui, la mort dans l'âme. Pendant cette période tragique, l'état de son coeur ne fit que s'aggraver et, le 14 Avril 1917, ce coeur qui avait battu si fort pour l'humanité cessa de battre.

Et je terminerai mon allocution, après avoir remercié la Municipalité de Montpellier et en particulier son Maire, M. FRACHE, par un poème très court de Zamenhof; je vous en donne la traduction en français et je vous le dirai ensuite en esperanto :

Oh ! mon coeur, bats paisiblement.

Hors de ma poitrine, ne saute pas à cette heure

Je ne peux plus me tenir aisément,

Oh, mon coeur.

Oh ! mon coeur ! après un long labeur ;

Ne vaincrai-je pas à l'heure décisive ?

Il suffit. Modère tes battements,

Oh, mon coeur.

Ho, mia kor' ne batu maltrankvile

El mia brusto nun ne saltu for !

Jam teni min ne povas mi facile

Ho, mia kor' !

Ho, mia kor' ! Post longa laborado

Ĉu mi venkos en decida hor' ?

Sufiĉe ! Trankviliĝu de l' batado;

Ho, mia Kor' !

Merci, Dankon.

R. L-W.

---

## VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

---

### N I M E S : ESPERANTISTA KULTURA RONDO

Pro multaj kialoj, ne eblis al ni akcepti la nederlandanan preleganton, kiu vizitis nian regionon .

Iom kompanse, ni ricevis la viziton de GUNNAR OLSSON, sveda vojaĝanto, instruisto pri slojdo, kiu alvenis en Nîmes tuj post lia vizito en Perpignan, dank'al al interhelpe de nia prezidanto René LLECE-WALTER kiu transdonis la adreson de la respondeculo de S.F.S., Roberto FRUS kiu gastigis lin dum unu semajno . Oni aranĝis renkontiĝon kun la gekursanoj de la 3-a lernjaro. Por preskaŭ ĉiuj estis la unua okazo elprovi siajn konojn kaj paroli kun eksterlandano. Tiu sperto tre plaĉis al ili.

Pli grava evento estis la prelego kun debato aranĝita kunlabore de "Maison de l'Europe" kaj de nia Rondo, sub la titolo : "Unu lingvo por Eŭropo : ĉu la angla ? ĉu esperanto ?"

Post enkonduko de S-ro LESAGE, Profesoro pri angla lingvo, S-ro DUC-GONINAZ, kiu afable venis el AIX por prezenti la temon, elmontris la neceson de komuna lingvo kaj la avantaĝon de elekto de esperanto tiucele.

Li prelegis mallonge, sed la debato daŭris preskaŭ du horojn.

La loko en la bulteno ne sufiĉas tiufoje por raportari pri tiu interesa kunveno. Ni detale parolos pri ĝi en la venonta numero.


R. VOLPELIBRE



# K R U C V O R T O J

## Horizontale \*

- 1- Glatigilo (du vortoj)
- 2- Glatigi - Ne forgesi (R)
- 3- Sufikso - Ebliganta ampleksi per unu sola rigardo la diversajn partojn de iu tuto.
- 4- Diservado - En pokalo  
Definitiva klara skribaĵo (R)
- 5- Japana pruno - Verda estas la nia.
- 6- Mara naĝbirdo (R)  
Ĝi progresas malpli rapide ol la tekniko (R)
- 7- Sufikso - Modernigi (R) - Montra pronomo.
- 8- Trinkajo (R) - Prepozicio - Adverbo
- 9- Nomode litero - Enkonduki en fremda afero - Posesivo.
- 10- Voĉdonas pri kandidato - Persona pronomo
- 11- Membrejo en la okulo (globulo) - Respekto oferprezintis
- 12- Mallarĝa randa elstarajeto de monero (R)  
Intesta elineĵo.




R. Raymond (1979)

## Vertikale \*

- 1- Postrikolti - Fari truon en barelo por eltiri fluaĵon (R)
- 2- Konstruo rememoriganta ion - En la komenco de rikolto.
- 3- Sufikso - Plialtigi (R) - Por peti mpetadon
- 4- Uzata ŝlosilo ĝi ne kongas - Longa randa trabo sur velipsipo (R)
- 5- Graĵnoj de greno senigita je ilia ŝelo kaj maldelikate pistitaj - Agrokultura skrapilo (R)
- 6- Inverse: posesivo - Plibonigas la kulturgrundo
- 7- Litrovas ĉion bona kaj ĉiam esperas sukceson
- 8- Tia estas la verko de Viktor-Hugo (R) - Estinta
- 9- Por ricevi (R) Bonfarta (R).
- 10- Persono supera pro sia rango, talento, k.t.p. (R) - Ekstrema plezuro pro la posedo de io (R)
- 11- Malgranda ŝtono nature fiksita al iu loko (R) - Enkondukis iun en kono pri ia afero.
- 12- Publika parolanto - Inverse posesivo.

\* - (R) nur radiko

\* - Solvo de la antaŭa problemo

  
 Solvo  
 de la krucvortoj  
 aperinta sur la n.º 72

P	A	N	T	O	M	I	M	I	S	T	O
A	N	A	R	K	I	S	T	A	I	N	
R	A	N	O		O	T		P	L	A	D
A	L		P	E	Z		P	A	T	R	O
L	O	K	O	M	O	T	I	V	O		
E	Q	A		I	T	A	L	I		S	L
L	I	K	E	N	O	J		M	E	T	I
O		A	L	E		L	A		K	A	R
G	U	T		N	D		R	I	S	M	O
R		U	R	T	I	K	O		T	E	
A	N	O		A	K	O	M	P	A	N	I
M	E	J		L		T	R	O		R	O




# 5 minutoj de paŭzo



La mantelo de la poŝtelisto

## HISTORIO PRI SPAC-KONKERO

Ni estis la unuaj aventuristoj kun la amikino LAIKA, pli poste sekvis la sovetianoj kaj finfine alvenis la usonanoj.



Pro teknikaj KIALOJ la « Libera Tribuno » estas prokrastita.



... mi volas sidi apud fenestro !



SEN VORTOJ



Glason da biero por mi, nur akvon por mia amikino. R. Finlay



# Si-ro Ikso kaj la fridujo

---

Sinjoro Ikso, oficisto en la poŝtoŝtorejo de pariza kvartalo, havis ĉarmoplenan edzinon, kies frivoleco kaj amuziĝemo ege ĵaluzigis lin. Li eĉ iom dubis pri ŝia seksfrivoleco.

Nu, unu tagon, "amiko kiu vin ŝatas", sed kiu ne konsentis sciigi sian nomon, telefonis al li dum lia postena tempo en la poŝtoŝtorejo, kaj diris: "Vi devus tuj iri al via hejmo, kie vi konatiĝos kun la amoranto de via edzino".

Sinjoro Ikso rapide veturis al sia loĝdomo, grimpis kurante la tri etaĝojn, diskrete enmetis sian ŝlosilon en la seruron de sia pordo, turnis ĝin, sed vane... la enirpordon fermis ja elinterne solida riglilo. Li tiam forte pugnobatis la pordon, kriante: "Malfermu, malfermu, Maria, estas mi".

Li devis atendi du - tri minutojn antaŭ ol lia edzino finfine malfermis.

- Mi estis en la banĉambro, klarigis ŝi..

Sinjoro Ikso, ŝin kolere forpuŝante trakuris la apartamenton, hurlante:

- Kie li estas? Kie li estas? Mi volas lin murdi!..

- Sed kio, kiun vi serĉas? kviete demandis la edzino.

- Vi tion bone scias, vian amoranton.

- Tamen, karula mia, vi bone scias ke mi amoras nur kun vi...

Kaj fakte, en la diversaj ĉambroj, Sinjoro Ikso nenion trovis, nek sub la litoj nek en la ŝrankoj.

Sed li subite aŭdis motoron zumantan el sur la placo situanta antaŭ lia loĝdomo.

Li saltis al la malfermita fenestro de la kuirejo, en kiu li troviĝis en tiu tre preciza momento, kaj vidis sur la placo junan viron, kiu havis kelkajn malfacilaĵojn kun sia torpedaŭto.

Konvinkita ke tiu viro estis la amoranto de lia edzino, li suprenlevis la fridujon kaj per eksterordinara streĉo de ĉiuj siaj muskoloj, li ĝin forĵetis al la aŭto, kiun ĝi fakte ĝuste trafis.

Sed, kunportita de sia ekscesa elano, li mem trairis la fenestran embrazon kaj, falinte el de sia tria etaĝo sur la cementan trotuaron, lia kranio rompiĝis kiel matura granato.

Kelkajn horojn poste, ĉe la pordego de l' paradizo, staris du viroj pridemandataj de Sankta Petro.

- Kio do okazis? demandis la Sanktulo al la unua.

- Mi ne scias, respondis li. Mi sidis en mia torpedaŭto, penante ĝin startigi, kiam mi ricevis surkapen tiun malbenindan fridujon.

- Kaj al vi? demandis Sankta Petro al Sinjoro Ikso.

- Mi, mi ĵetis la fridujon al la kapo de tiu malbeninda ulaĉo kiu estas la amoranto de mia Maria, kaj pro fortega puŝo, fleksiĝis la apogstango de mia fenestro, kaj mi falis el mia tria etaĝo sur la cementon de la placo.

Sed responsas pri ĉio tiu abomeninda porko, kiu malpurigis mian liton.

- Mi, mi malpurigis vian liton? Vi estas absolute freneza...

Sed, sammomente, alvenis juna, tre belaspekta viro, tre leĝere vestita.

- Kaj vi, kion vi volas? demandis la Sanktulo.

- Mi, mi nur estis en la fridujo.....




# KRIS-NASKIĜO ...

*Leonora-Dina King,*

*is delighted to announce the  
birth of her sister.*

*anonas kun ĝojo la naskiĝon  
de sia fratineto.*

*è felice di annunciare la  
nascita della sorellina.*



**Debor**

**Debor**

*North Middlesex Hospital (Edmonton)  
20-9-1979 \* 21 h. 30 \* 3,630 kg.*

*Maria & Geoffrey KING*

*14, Elmdale Road - LONDON n° 13 4 UL (GB)*



**Okaze de Kristnasko kaj Jarŝanĝo  
ni esprimas niajn sincerajn Bondezirojn  
al ĉiuj niaj Legantoj kaj Simpatiantoj.**

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 4<sup>me</sup> Trimestre 1979

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes